

# LA PROGRESO

OFICIALA ORGANO DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: PRAHA-VII. SOCHAŔSKÁ 333.

Jarabono (10 numeroj) Kĉ 20.—, fremdlando: bonvaluta Kĉ 25.— (5 sv. fr.) malbonvaluta Kĉ 15.— (3 sv. fr.) Konto de la ĉekoficejo Praha n-ro 34.271.

La unua n-ro de la nova jarkolekto aperos 25 Novembro.

## PROPAGANDU PER FAKTOJ!

Aŭtuno venis, vintro proksimiĝas. En la naturo tempo de ĝenerala ripozo, ĉe ni esperantistoj tempo de semado. La klubaj kunvenoj revigliĝas, en klubaj komitatoj ree estas diskutataj kaj poste pli malpli sukcese realigitaj la kutimaj entreprenoj: publikaj paroladoj, kursoj, ekspozicioj.

Sed ĉu en ĉiuj kluboj? Kaj se jes, ĉu oni laboras ekonomie, ce ante atingi la maksimumon per la ĝusta uzo de energio? Preparante kurson oni anoncas tion unu du fojojn en lokaj gazetoj kaj per kelke da afiŝoj en komercejoj, iuloke ankaŭ per specialaj afiŝoj sur publikaj afiŝtabuloj.

Sed ĉu en ĉiuj lokoj la kluboj zorgas, ke la publiko aŭdu pri esperanto ne nur ĉe la okazo de la kursoj, sed konstante *dum la tuta jaro*? Ĉu ili zorgas, ke la publika opinio de ilia urbo estu konstante, iom post iom, ŝanĝata favore al esperanto? Nur tiam la kursoj povas esti plene sukcesaj. Ni bone scias — ĉar oni de pluraj lokoj informas nin pri tio — ke ekzistas gazetoj, kiuj pli ŝatas publikigi lokajn skandaletojn kaj politikaj disputojn anstataŭ informi siajn legantojn pri gravaj faktoj de la nunepoka vivo, inter kiujn esperanto ja nepre apartenas. Sed ni scias, ke ekzistas kelkdeko da gazetoj emaj informi ankaŭ pri lingvo internacia. Zorgi, ke almenaŭ en tiuj aperadu informoj pri progresado de esperanto, estas unu el la plej gravaj taskoj de kluboj kaj de izolitaj esperantistoj.

Da materialo estas sufiĉe, kiel montras la rubriko Propaganda Fako en ĉiu nia

numero. Tiaj mallongaj notizoj pri faktoj, eĉ se ili ne enhavas tiel efikan novaĵon, kiel estas la oficiala rekono de esperanto en la Ligo de Nacioj, valoras propagande pli ol longaj artikoloj teoriaj, precipe se tiuj ĉi estas skribitaj en stilo de antaŭmilita propagando. Kion juĝi pri la propaganda lerteco de samideano parolanta en propaganda artikolo pri esperanto kiel lingva projekto, kiu estos utila, kiam ĝi estos ĝenerale enkondukita, kaj tute forgesanta atentigi pri la okazoj, en kiuj esperanto jam nun estas uzata. Anstataŭ paroli ekzemple pri *estonta* utileco de esperanto por turisto en fremdaj landoj, kial oni ne raportas pri la faktoj, ke jam nun, en la nuna stato de la movado, dank' al la sindonaj delegitoj de UEA esperanto *estas uzata* de miloj kaj miloj da vojaĝantaj personoj. La certa parto de la publiko jam nun favora al la celoj de lingvo internacia pli ŝa'as aŭdi, kio do jam estis realigita el la promesoj de propagandantoj, pli ŝatas aŭdi faktojn kaj vidi pruvojn. La postmilita propagando de esperanto akiris multajn tiajn faktajn sukcesojn en la uzado de esperanto, estas do peko kontraŭ ekonomiaj principoj de ĉia laboro ne uzi ilin. Nur kiam scio pri iu loka, landa aŭ regna sukceso estas disvastigita en la tuta mondo, nur tiam ĝi havas veran signifon. Tion ne devus forgesi niaj samideanoj. Ne opinii vian movadon kaj vian laboron loka, ni ĉiuj estas interligitaj, unuj dependas de la aliaj. Subtenante vian Asocion vi fortigas vin mem, subtenante K. R. vi fortigas vian Asocion kaj subtenante UEA vi helpas starigi la movadon sur fortan fundamenton, sen kiu eĉ via loka klubo ne povus sukcesi.

R. H.

## LITERATURO

### HO, MIA HEJM'?

(La ĉeĥa himno.)

Ho, mia hejm', amata hejm'!  
Jen bruetas pin-arbaro,  
akvo ŝaŭmas en rokaro,  
en ĝardeno ĉarma flor'  
ravas min per bonodor' —  
jen la bela lando ĉeĥa,  
tie estas mia hejm',  
tie estas mia hejm'!

Ho, mia hejm', amata hejm'!  
Loĝas tie gento slava  
noblanima, vigla, brava,  
kontraŭ malfavora sort'  
ŝirmas ĝin la propra fort' —  
jen la ĝlora gento ĉeĥa,  
inter Ĉeĥoj mia hejm',  
inter Ĉeĥoj mia hejm'!

Libera traduko de M. Lukáš.



### NAD TATROU SA BLÝSKA

(La slovakia himno.)

[:Furiozas fulmoj  
super nia Tatra,;]  
[:plue malgraŭ tio  
vivos Slovakio,  
nia lando patra!:]

Tradukis M. Lukáš.



FEDOR BOGDANOV:

### LA KRANIO

Estis frua dimanĉa mateno. Ĉiuj aldormadis siajn lastajn, la plej dolĉajn minutojn. Mi leviĝis, vestiĝis, kaj prenis mian ĉapelon en la manon, por eliri eksteren. Jam de infaneco mi estis kutiminta leviĝi frue — antaŭ sunleviĝo — kiam la aero estas freŝa, kiam la brusto libere spiras, kiam la najtingalo plej klare kaj sinforgese kantas, kiam la spirito supreniras en eterajn mondojn, kaj la revoj flugas, flugas per flugiloj de hirundo. Kiam la unua sunradio per kiso vekas la montajn florojn kaj admonas la cervon — la balkanan reĝon — serĉi sian kaŝejon, tio estas la minutoj, en kiuj mi sentas min la plej feliĉa, mia plej amata tempo.

Mi volis promenadi ekstere, malproksime de la urbo, tute sola: tiel estas pli agrable. Mi jetis rigardon al mia fratineteto, kiu kuŝis en sia lito dronante en siaj blondharoj. Ŝi dolĉe, anĝele ronkis, ferminta delikate siajn blujajn okuletojn, kaj sur ŝiaj vangetoj rozkoloro ludis. Mi kliniĝis, kisis ŝin sur la ŝvitanta frunteto; ŝi svingis la maneton, turniĝis je la alia flanko kaj denove ekronkis unusone...

Mi eliris ĝis la kverkarbareto. Ĥoro de birdoj, najtingaloj, konkuris per siaj mirindaj melodioj. Ĉiu el ili kvazaŭ celis superi siajn kamaradojn per sia artistarto. — Mirinda estis la melodio de ĉiu el la apartaj kantistoj, sed dia estis la harmonio, la komuna ario de tiu ludema, nature kombinita sorĉa ĥoro. — Enpensiĝinta mi estis, kiam nevole mi vidis, ke mi estas alveninta en la tombejo; malproksime de l'urbo estis kelkaj malnovaj tomboj, ĉirkaŭitaj de herboj kaj kampoŭfloroj. La krucoj jam putriĝintaj aŭ kovritaj de musko. Tie ĉi kaj tie belaj floroj floras sur tiuj trankvilaj loĝejoj, malproksime de l'monda bruado, de l'ĉiutagaj zorgoj... Kaj mi kliniĝis, forŝiris tiujn bonodorajn florojn plantitajn ĉi tie kaj surŝutatajn de l'diino mem de l'universo... Mi ekvidas detruitan tombon, ostojn, homan kranion. Kaj mi haltas super ĝi. Rigardas mi kaj sennombraj pensoj eniras mian kapon. Ĉu iu paŝtisto paŝtis senzorge sian ŝafaron sur montetoj kaj ankoraŭ pli senzorge kondukadis ludante per sia mielkavalo\*) sian ŝafaron al paŝtejo de fruaj matenoj ĝis malfruaj lunaj vesperoj? Aŭ tio ĉi estas iu juna forto, forŝirita de l'koro de patrino?...

Kaj la dentoj estas ankoraŭ puraj, belaj, blankaj, eĉ ne unu el ili mankas. Eble estas la kapo de l'vilaĝa belulino — la fiereco, la floro de l'vilaĝo, post kiu malsaĝe kuradis junuloj por ektrinki la akvon el ŝiakruĉo aŭ kaldronoj aŭ fine ricevi eron da ocimo!\*\*)...

Kaj sur tiuj ĉi lipoj, kiuj nun mankas, formangiĝitaj de l'neniamsatigebla tero, varmega kiso estis ludanta kaj tiuj ĉi dentoj transrozaj lipoj estis jetantaj doloran „ah!“ forŝiritan el la subterajoj de karega, amanta koro?

Sed nun? — nun ŝi kuŝas tie ĉi, por ke ĉiu preterpasanto ŝin piedpuŝu! Kaj ĉu, ho Dio, ĉi tie estas la fino post tiom da penoj, ĝojoj, revoj, celadoj, larmoj kaj esperoj!

El la bulgara Antologio de Iv. H. Krestanoff.

\*) Paŝtista blovinstrumento, simila al fluto. R. tr.  
\*\*) Ĉeĥe: bazalka, lat. Ocimum.

## NOVA EŬROPO

Fr. Plaminková:

### KION LA VIRINOJ ATINGIS EN LA ĈEĤO-SLOVAKA RESPUBLIKO

El manuskripto trad. M. Cimrová.

#### LEĜODONAJ REFORMOJ DEFENDATAJ DE VIRINOJ.

En tiu ĉi artikolo estas ripetataj kelkaj detaloj jam menciitaj, sed la tasko de tiu ĉi artikolo estas almenaŭ iom karakterizi la agadon de deputitinoj ĉie, kien en la parlamento penetris iliaj iniciatoj kaj partoprenoj.

Oni devas konstati, ke la deputitinoj defendas la rajton de virinoj, sed la leĝodonaj reformoj de ili proponataj ne rilatas ekskluzive tiun ĉi problemon, sed ili rilatas ĉefe la bezonojn de vastaj rondoj de la popolo.

Ekzemple la deputitinoj prezentis proponojn rilate la nutradon de loĝantaro kaj moderigon de ilia mizero kaŭzita de seka vetero aŭ de naturaj katastrofoj, kaj ankaŭ alie ili proponis ŝanĝojn en leĝaj reguloj, kiuj rilatas juĝan civilan leĝaron kaj soldatan punleĝaron. Kelkaj leĝoj defendas la interesojn de militaj invalidoj kaj egaligon de pensioj, aliffoje la leĝan reguligon de dimanĉa ripozo en komercejoj kaj oficejoj, difinon de kompetenteco de diversaj ministerioj k. t. p. La deputitinoj estis inter la proponistoj de leĝoj pri terposeda reformo, pri disigo de la eklezio kaj la ŝtato kaj pri egalvalorigo de eklezio de „bohemiaj fratoj“, de „eklezio ĉehoslovaka“ kun la eklezio roma. Kontraŭe la deputitino de popola (klerikala) partio defendis la interesojn de sia partio kaj intervenis ekz. kontraŭ la forigo de kruco el lernejoj. Lernejaferoj estas ofta objekto de proponoj kaj interpelacioj de virinoj kaj ili tuŝas ĉiajn lernejojn, de ĉiuj specoj kaj gradoj, de sublernejoj ĝis la mezaj, fakaj kaj altaj. Unufoje tio rilatas protestojn de ĝenerala karaktero: instruado de komerca scienco, starigo de fakultatoj, aŭ la zorgon pri infanoj kun diversaj korpaj difektoj, alian fojon oni pritraktas la interligitecon de virinaj aferoj kun aferoj lernejoj, ĉu ĝi koncernas la ĝenerantojn aŭ ĝeinstruistojn aŭ ilin ambaŭ. Ĉi tien apartenas la proponoj: pri reguligo de salajroj kaj pri juraj interrilatoj de zorgantinoj pri infanoj en sublernejoj; pri institutaj inspektorinoj en lernejoj por germanlingvaj virinoj; pri fondo de praktikaj kursoj por virinoj kaj knabinoj; leĝan aprobon de propono, ke knabinoj 14—16jaraj nevizitantaj aliajn lernejojn, estu devigataj vizitadi vesperajn kompletigajn lernejojn (precipe junularo okupita en la komerco kaj industrio). Iniciatojn por reorganizo de knabinaj lernejoj por virinaj profesioj kaj por reguligo de vivokondiĉoj de instruistaro en tiaj lernejoj (vidu parton edukigan) havis la deputitinoj el partio de ĉsl. socialistoj. La leĝo starigas ŝtatigon de tiuj ĉi lernejoj kaj egalrajtigas la instruistaron en tiaj lernejoj kun la instruistaro de aliaj ŝtataj fakaj lernejoj. Estis starigitaj precizaj tipoj de tiuj ĉi lernejoj. Per tio estis farita grava parto de kultura laboro.

La intereso de okupitaj virinoj estas tre ofta objekto de intervenoj de deputitinoj. Ili defendas situacion de virinoj en ŝtataj institutoj, oficejoj kaj

ekzemple defendas virinon laborantan en gastejoj; la deputitinoj proponas forigon de edziĝomalpermeso de virinoj laborantaj en publikaj oficoj.

Diversaj proponoj havas celon solvi la demandon pri patrineco de vidpunkto ekonomia, sed ankaŭ de vidpunkto higieno-morala (zorgo pri patrinoj kaj suĉinfanoj, transpreno de zorgo pri malriĉaj akus-intinoj kaj iliaj infanoj per la ŝtato, deviga patrina asekuro de ĉiuj laborantaj virinoj, ĉu manlaboristinoj ĉu laboristinoj intelektaj, aŭ virinoj okupitaj en hejmoj; aljuĝon de titolo „sinjorino“ ankaŭ por ĉiuj laborantaj virinoj kaj needziniĝintaj patrinoj; ŝanĝo de regularo koncerne la forigon de embrio).

Tiujn ĉi proponojn iniciatis kiel ĉeĥaj, tiel germanaj socialistinoj de diversaj partioj. Ŝanĝoj al la leĝo pri formalajtoj de edzeca kontrakto estis proponitaj de deputitino de partio nacidemokrata.

La komuna intereso devigis la reprezentantinojn de diversaj politikaj partioj, ke ili komune manifestu en parlamentejo la 17. de januaro 1922. Okazis t. n. „Tago de virinoj“, kiam la deputitinoj de partioj social-demokrata, ĉ. ho-socialista, komunista kaj popola (klerikala) parolis kontraŭ la vendado la *alkoholtrinkaĵoj al junaj personoj*.

La virinoj de diversaj politikaj tendencoj komune postulis forigon de regulita prostitucio kaj batalon kontraŭ seksmalsanoj. La iniciativo venis el vicoj de virinoj. Jam dum aŭstria regado akceptis la virinaj societoj (ekz. centra asocio de ĉeĥaj virinoj, virina ĉeĥa klubo) principon de abolicio en konsento kun opinioj de nuna prezidanto Masaryk, kiu havis ankaŭ inter la virinoj multajn partianojn kaj kies opinio pri feminismo efikis je multaj viroj. En la respublika parlamento faris koncernantan proponon partio de ĉeĥaj socialistoj, la ministerio de higieno ellaboris la leĝon kaj raportanto en higieno-komitato estis sinjorino Landová-Stychová, kiu sukcesis fari kelkajn ŝanĝojn kontraŭ la registara propono (ekz. forstreko de paragrafo, laŭ kiu ne estas punata profesie praktikata prostitucio).

La leĝo ordonas devigan kuracadon de seksmalsanoj, forigas ĉiujn policajn kaj aliajn administraciajn aranĝojn celantaj la inspektadon super prostitucio kaj forigas la bordelojn. Tiu ordono koncernas egale la virojn kiel la virinojn.

La deputitinoj laboras en diversaj komitatoj de nacia parlamento kaj ili estas tre ofte komisitaj per raportado en diversaj proponoj de leĝoj en komitatoj kaj en plennombra parlamenta kunveno.

Fino.



#### TAYLORISMO KAJ VIOLONISTOJ.

Ŝajnas esti eble ne kredebla, ke oni povus je la violono studi du poziciojn samtempe kaj duonigi tiamaniere la penigan ekzercon — kaj tamen tio ĉi estas vera.

*La violonistoj de la tuta mondo havas grandan sensacion.* Aŭtoro de tiu ĉi „violona taylorismo“ estas ĉeĥa profesoro *Bed ich Voldan* de konservatorio en Praha. La rezulto de liaj kelkjaraj klopodoj estas ĵus tiu-ĉi „renverso“ en la violona instruado. Kiel oni scias, ĉiam du pozicioj postulas je violono parencan fingrometadon, tiel ke la ok pozicioj povas esti reduktitaj je kvar. Prof. Voldan metis tiun ĉi parencecon kiel bazon por sia reformita sistemo kaj kreis tiamaniere efektive *grandiozan metodon verkon*.

La sistemo konsistas el tri partoj: El „Nova

metodo de pozicioj“ (komencebla post la trastudo de I. pozicio de kia ajn metodo), el „80 kantoj“ kaj „40 etudoj“, kio reprezentas grandegan materialon sur kelkaj paĝoj kompare al aliaj metodoj. La kantoj enhavas la plej belajn melodiojn ĉeĥoslovakajn, jugoslavajn, germanajn kaj anglo-usonajn (kun teksto). Oni ekzemple konsideru, ke ĉiu el la 80 kantoj estas ludebla en du pozicioj (en parenca pozicio preskaŭ sen ekzercado), kio reprezentas entute 160 kantojn, kiuj devus esti — laŭ la malmovaj sistemoj — ĉiuj presitaj; sed la metodo de prof. Voldan plenumas sian taskon je duono pli rapide kaj malmultekoste. Same en la 40 etudoj la studento lernas du poziciojn samtempe.

Tion tuj bone komprenis la fama konservatorio en Praha kaj enkondukis la verkon en la muzika instituto. La ministerio de instruado kaj ĉeĥa akademio de artoj kaj sciencoj ekkoninte gravegan signifon de la verko, subvencis la tradukon de tekstoj, kio ebligas fortan disvastigon de la verko ne nur en Eŭropo, sed ankaŭ trans la maro.

Ĉiuj tre gravaj metodaj analizoj estas tre detale priskribitaj ĉeĥe, jugoslave, angle, germane rekte en la metodlibro, aparte en broŝuroj france, itale, ruse, pole kaj ukraine. La verkojn eldonis „Neubert-Edition“ en Praha, Ĉeĥoslovakio.

*Fakuloj proklamas, ke tiu ĉi verko estas unika en la tuta muzika mond-literaturo*, kiel laŭ vidpunkto melodia tiel muzika. Detaloj ĉe la redakcio de la Progreso.

J. P.

Reprezo en nacilingva traduko rekomendata.



### Dr. ALEX BATĚK.

Tiu ĉi konvinkita kaj konvinki kapabla apostolo de racionalismaj idealoj plenigis siajn 50 jarojn. Kiam vidis lin prediki sur placo Staroměstské unu pesimisma estetikisto kaj mokanto pri maŝina kulturo, li trovis lin maljunuleto nedika, kaj nenion alian sciis diri pri li. Estetikistoj serĉantaj la plej altan idealon belecan iom tro ofte forgesas idealon de ĉiutaga bezono. La celado de Batěk estas tute kontraŭa. Trovi kaj altrudi al homoj la plej taŭgajn rimedojn por ilia labortaga vivo li rigardas kiel idealon decantan al viro. Tial li esploras ĉiujn praktikajn konsilojn kiujn povas al individua vivo doni naturscienco, higieno, psikologio, etiko, metafiziko, religio kaj precizigas ilin en konkretaj reguloj por individua homo. Laŭ tio li estas laŭtempe unua pragmatisto en nia nacio. Estas nature, ke tia spirito baldaŭ ekkonis la gravecon de esperanto kaj mem kunlaboris en nia movado. Li estis kunfondinto kaj unua prezidanto de iama Bohema Asocio Esperantista kaj kunlaboranto de niaj gazetoj. Ankaŭ liaj propagandaj artikoloj meritas dankan atenton.

Stan. Kamaryt.

### GVIDANTOJ DE KURSOJ !

Uzu en viaj kursoj por komencantoj  
**VORTARO ESPERANTO-ĈEĤA**  
de Bedřich Tittl.

Prezo 5 Kč, bindita 7-50 Kč.

..... Granda rabato laŭ interkonsento. ....

## ESPERANTA MOVADO

### LA XVI. UNIVERSALA KONGRESO EN WIEN

6.—13. Aŭgusto 1924.

En nia raporto pri la kongreso Wienera ni klopodas prezenti pri niaj legantoj koncizan bildon pri la traktado kongresa. Malgraŭ tio, ke oni riproĉas al niaj kongresoj malmultan laboron, okazis en Wien kelke da interesaj debatoj. Eĉ la debato pri la organizo, lasta kiel ni povas rajte supozi, prezentas atentindan materialon eĉ por samideano, kiu ne tro ŝatas tiun ĉi temon.

Malgranda amplekso de nia gazeto ne permesas raporti pri fakaj kunsidoj (cetere ni ne ricevis informojn pri ili) nek pri amuzaj aranĝoj. Oni multe kritikis la kongreson. Ni ne publikigas plendojn, ĉar ni ricevis nenion de niaj legantoj kaj ni mem, sciante bone el nia propra sperto, kiel malfacile oni laboras, dum aliaj facile kritikis, estas emaj, se ne pardonu, do almenaŭ silentu tie ĉi pri ili. Cetere, ŝajnas al ni, ke kritikado havas nur tiam sennon, se ĝi celas plibonigon, kaj por ke la venonta kongreso evitu erarojn de la pasintaj estus tre saĝe ĉiujn rimarkojn pri tio sendi al Centra Komitato, kiu de nun prenas sur sin gvidan rolon ankaŭ pri la kongresaj aferoj.

### KUNVENO DE U. E. A.

Jaŭdo, 7. Aŭgusto, 10-15 h.

D-ro Privat resumas la ĉefajn punktojn de la Jara raporto, publiigita en la Kongresa Libro. Li anoncas eksigon de S-ro Stettler, prez. de UEA, informas pri la konsisto de la nova komitato, nun 25-membra (el ĈSR krom S-ro Hromada, S-ro Scholze, prez. de Germana Esp.-Ligo). La nombro de la membroj kreskis de 6.150 al 6.300 Li akcentas, ke nur atinginte 10.000 membrojn, UEA troviĝos sur firma bazo materia kaj nur tiam povos sin plene dediĉi al realigado de siaj planoj. Interesaj estis sciigoj de S-ro Fischer (Bucurest) kaj S-ro Isbrücker (Haag): En Rumanio rajtas esti membro de Nacia Asocio nur persono samtempe paginta al UEA. En Nederlando Nacia Asocio havas du specojn de membroj: naciaj kaj internaciaj. Tiuj ĉi lastaj estas samtempe membroj de UEA.

### SOLENA MALFERMO

Ĝi okazis nur la kvaran tagon de la kongreso, dimanĉe en la belega salonego de *Konzerthaus*, kiu estis plenplena de la kongresanoj. Prezidanto estis S-ro D-ro Minibek, ministeria konsilanto en Wien, Vicprezidantoj: D-ro Privat, prez. de Centra Komitato, S-ro Warden, Vicprez. de Akademio, S-ro Merchant, prez. de K. R., S-roj Schröder kaj Schamanek, plue: D-ro Kamaryt por Ĉeĥoslovakio, S-ro Aktarĝiev por Bulgaroj, D-ro Steche por Germanoj, S-ro Deligny por Francoj, Pastro Lajos por Hungaroj, S-ro Filipetti, urbestro de Milano, por Italoj kaj Prof. Bujwid por Poloj. El tiuj ĉi nacioj estis la plej multo da kongresanoj. Sekretarioj de la kongreso estis S-ro Edmonds (K. R.) kaj S-ro Kreuz (UEA).

Salutan paroladon havis D-ro Minibek. Poste sekvis, brila kiel ĉiam, parolado de D-ro Privat. Oficiale salutis la kongreson D-ro Horicky en la

nomo de kanceliero Seipl kaj de vickancelario, D-ro Emmerling, vicurbestro de Wien, Dro Suess, Dekano de filozofia fakultato (germane kaj esperante) en la nomo de Universitato de Wien, Plue: Grafo Lasocki, ministro de Pola respubliko, D-ro Dietterle en la nomo de Germana Ministerio de Interno, Komandanto Mangada-Rosenörn (Hispana registaro), S-ro Isbrücker (Nederlanda), S-ro Fischer (Rumana ministerio por Komercio kaj Industrio), S-ro Morariu (Rumana Ministerio de Interno kaj Polica Administrato), S-ro Horner (Ruĝa Kruco).

Salutoj de naciaj delegitoj estis interesaj tiun ĉi fojon per tio, ke ĉiu el 25 parolintoj diris komencan frazon en sia gepatra lingvo. Tiamaniere bone manifestiĝis la diverslingveco de la kongresanoj kaj la grandega utilo de la lingvo internacia, unuiganta ĉiujn.

Por Ĉeĥoslovakio salutis la kongreson D-ro Kamaryt, Vicprez. de Ĉs. Asocio Ĝsp. kaj Inĝ. Scholze, prez. de G. E. L. Ekstereŭropaj landoj reprezentistaj estis: Aŭstralio, Ĉinio, Meksikio kaj Urugvajo.

### I. LABORKUNSIDO

Lundo, la 11./8.

S-ro Warden, Vicprez. de la Akademio, legas la raporton de la

#### *Sekcio por gramatiko,*

verkitan de ĝia direktoro D-ro Walter Lippmann.

Specialaj taskoj de la G Sekcio estas la kontrolo de la nuna apliko de nia lingvo en la publiko, kaj helpo, ke la lingvo estu uzata pure kaj korekte. Ĝia aŭtoritata influo estas uzota en okazo, ekz., se esp-a gazeto atentinda daŭre pekus kontraŭ iuj reguloj de nia gramatiko aŭ se bonfama aŭtoro konstante uzus en sia libro formojn gramatike nekorektajn. Tiam la G. S. povas peti la erarinton eviti la erarojn estonte kaj averti pri ili.

Sed alia pli ofta kaj tre necesa laboro estus la kontrolado de nacilingvaj instrulibrooj de esp-o, kiuj precipe en iuj lingvoj estas multaj, sed ne ĉiam senripoĉaj. En tiu ĉi esplora kaj konsila tasko povas helpi al G. S. diverslingvaj samideanoj, tute spertaj en gramatikaj aferoj, eĉ se ili ne estas LK-anoj.

Alia tasko de G. S. kaj simile de aliaj sekcioj de L. K. estas donadi respondojn al demandoj pri diversaj lingvaj problemoj, kiuj troviĝas ja en esp-o, spite ĝia facileco, sekve de natura komplikeco de la homa pensaro kaj de la naciaj lingvoj.

La raporto do, kiel videble, parolas nur pri faritaĵoj. Eĉ regularon la Sekcio ne havas kaj nur provizora regularo estas preparata.

Tamen, se vi volos kritiki la malriĉecon de la faritaĵoj, la Direktoro atentigas, cetere prave, pri la fakto, ke laboro en la Sekcio, same kiel ĉiu laboro por esp-o, estas eksterprofesia kaj do dependas de la hazardaj kvantoj da tempo kaj forto, kiujn lasas liberaj pli urĝaj devoj ĉiutagaj.

El la objektoj, kies detala esploro estis petata, la Direktoro citas: ĝusta uzo de -ata kaj -ita; formiĝo de la vortoj „Esperantujo“ kaj „avidata“; plursenceco de la vorto „cento“; uzo de la refleksiva pronomo en dependaj propozicioj.

#### *Sekcio por Konkursoj kaj Premioj*

La raporto de D-ro Privat, Direktoro de la Sekcio por konkursoj kaj premioj (Membroj: S-ino Hankel kaj S-roj Isbrücker, Kühnl, de Mènil kaj

Stroele) informas, ke laŭ ĝia propono la Akademio decidis aljuĝi honoran rekompenccon por 1924 al jenaj du verkoj:

1. *Preter la vivo*, originalaj poemoj de Julio Baghy

2. *Johano la Brava*, de Petöfi, trad. de K. de Kalocsay.

En la debato diversaj parolantoj esprimis kaj subtenis la deziron pri *Enciklopedia Vortaro* laŭ la metodo de Kabe kaj pri traduko de gravaj *popularsciencaj* verkoj; D-ro Dietterle plendas pri nesufiĉa subteno de esp-istoj al la impona *Vortaro de Wüster*; iuj deziras, ke ĝi enhavu esp-ajn difinojn anstataŭ la germanaj. Oni sciigas, ke S-ro Delanoue prilaboras *bankfakan* vortaron, S-ro Rollet de l'Isle la *radio-vortaron* kaj ke la *kuracista* vortaro de S-ro Briquet estas tute preta. Oni bedaŭras, ke la Akademio Sekcio por Teknikaj Vortaroj ne sendis raporton. La ĝeneralan deziron havi tiajn vortarojn esprimas la rezolucio de D-ro Hanauer, akceptita:

*Koncerne la teknikajn vortarojn la Kongreso petas la inĝenerojn kunsidontajn dum ĝi, ke ili faru al la Akademio proponon, laŭ kiu oni alproksimiĝu al la uzado de esperanto en la teknikaj internaciaj rilatoj.*

Pri K. K. K.

S-ro Warden prezentas la lastan raporton de la K. K. K. (Konstanta Kongresa Komitato aŭ Komisiono), ĉesanta nun funkcii, kaj plendas, ke Loka K. K. ne publikigis lian raporton en la Kongresa libro. S-roj Schröder kaj Schade deklaras, ke multaj poŝtaoj perdiĝis pro kulpo de Wienera poŝto. D-ro Privat bedaŭras, ke K. K. K. kiel komisiono de Centra Komitato ne sendis la raporton al tiu ĉi. S-ro Warden opinias, ke K. K. K. estas tute memstara. S-ro Edmonds, kiel sekretario de Konstanta reprezentantaro de la Naciaj Societoj (K. R.) anoncas, ke la naciaj societoj unuanime, krom unu sindeteno, konfirmis la proponon de la Geneva konferenco forigi la K. K. K. „kiu pezigas de jaro al jaro nekonatajn deficitajn de antaŭaj kongresoj sen ia publikigo de kontoj.“ Ĉar ankaŭ U. E. A. aprobis la decidon, tiu forigo de K. K. K. estas nun definitiva. Tamen, ĉar S-ro Wardeu opinias, ke por tio estas kompetenta la kongreso, S-ro Degen prezentas la jenan rezolucion, kiu estis akceptita kontraŭ 6 voĉoj kaj per kiu fine tiu ĉi afero estis finita:

*La XVI. kongreso en Wien deklaras, ke pro la definitiva ekfunkciado de la oficialaj institucioj laŭ la kontrakto de Helsinko, la decidpovo kaj la solvo de organizaj demandoj apartenas de nun al la rajtigataj organizaĵoj de la esperantistaro, UEA kaj Konstanta Reprezentantaro de Naciaj Societoj (K. R.), kiuj havas la devon ilin prizorgi kaj tial la kongreso rekomendas, ke oni ne plu ŝargu per ili la tagordon de la universalaj kongresoj.*

Fine do, ni povas havi la esperon, ke en niaj kongresoj ni havos okazon por diri kaj aŭdi ion alian ol organizaj aferoj.

K. R.

Espereble niaj legantoj konas la signifon de tiuj ĉi du literoj. Ili pagas ja por la organizaĵo, portanta ilin po 2 Kĉ jare. Estas komencaj literoj de Konstanta Reprezentantaro de la Naciaj Societoj, pri kies agado dum la pasinta jaro raportis S-ro Edmonds, ĝia sekretario-kasisto, en la Kongresa libro kaj krom tio koncize en la I. laborkunsido

Jen mallonge kelkaj detaloj, laŭ la oficiala protokolo kongresa:

La kongreso en Helsinki 1922 rekomendis, ke estonte la esperantistoj komisiu siajn organizajn aferojn ne plu al hazardaj ĉeestantaroj de kongresoj, sed al ĉiuj organizataj societoj de la esperantistaro per duobla aranĝo: Unuflanke UEA, kiu grupigas ĉiujn kotizantajn individuojn en la tuta mondo kaj duaflanke la naciaj societoj sendantaj po unu reprezentanto en K. R. La celo estas klara: niaj aferoj ne estu balancataj laŭ hazardo de geografio aŭ riĉeco de vojaĝantoj, sed pri ili povu decidi ĉiu kotizanta esperantisto, tute trankvile kaj regule dum la tuta jaro, en kunsidoj kaj skribaj voĉdonoj, kiel estas en ĉiu alia grava movado. Tiuj du korporacioj UEA kaj KR subskribis tiel nomitan *Kontrakto de Helsinki*. Iliaj reprezentantoj kunsidis Paske 1924 en Genève (v. p. 71.). Ambaŭ korporacioj interkonsentas pri nomigo de 6 personoj por *Centra Komitato de la Esperantista Movado* (C. K.).

Al K. R. kotizas nun 20 Naciaj Societoj. Por 1923 kaj 1924 la K. R. povos meti al la dispono de C. K. almenaŭ 60 anglajn funtojn (9000 Kč). Espereble tiu sumo, ankoraŭ tre malgranda, pligrandigos iom post iom.

## II. LABORKUNSIDO

Mardo, la 12./8.

S-ro Privat prezentis raporton de la *Centra Komitato*, kiu enhavas unue ĝeneralaĵojn: traktado por elekti la urbon de la XVI., Radiokonferencon en Genève, intervenon ĉe la Internacia Ekonomia Kongreso en Lyon, k. a. S-ro Page prezentas en ĝi informojn pri la financoj de C. K., S-ro Hromada pri stato de la gazetara servo, D-ro Dietertele pri statistiko de la movado kaj pri restarigo de la Internacia Instituto de esperanto, S-ro Kenn pri sia ĉeesto en la kongresoj de hispanaj, rumanaj kaj bulgaraj esp-istoj. Anstataŭ S-ro Chavet, kiu ekzistis el ĉiuj esp. oficoj pro sia profesia okupateco, la K. R. elektis kaj UEA konsentis S-ron Rollet de l'Isle.

Grandan parton de la kunveno okupis la diskuto pri la *Kongresa Regularo*, kiu fine esti akceptita post kelkaj ŝanĝoj. Ĉe tiu okazo la kongreso denove devis okupi sin pri afero de K. K. K., sekve de franca propono. Sed en la debato la kongreso rifuzis ŝanĝi ion en la forigo de KKK, do jam la kvaran fojon, ĉar unue la forigo estas enhavita jam en la Kontrakto de Helsinki, duan fojon en Geneva konferenco kun sekvinta skriba konfirmo de 21 naciaj societoj kaj trian fojon en la I. labora kunsido kongresa, la tagon antaŭan. Bone diris S-ro Edmonds, „ke ni certe dankas al tiuj personoj, kiuj en la komenco de la movado subtenis la fondatajn instituciojn, sed ke jam delonge venis la tempo, ke la esperantistoj mem per regula kotizado subtenu siajn organizaĵojn kaj funkcigu ilin laŭ asocia demokrata sistemo.“ Kaj ni aldonus: Se la mono per kiu iu ajn persono bonvole pagis la kostojn de C. O. en Paris kaj la deficietojn de la antaŭmilitaj kongresoj, estis donaco, la donacinto ne havas moralan rajton repostuli la monon. La esperantistaro, ĝiaflanke, ne rajtas postuli kontojn pri la sumo de la donacita mono, se la donacinto ne deziras, ke publiko tion konu. Sed se la donacinto nun havas gravajn kaŭzojn por repostuli la monon donacitan, bone, ni home kapablas tion kompreni kaj rigardi tiun monon kiel prunton. Sed tiam, se temas pri kreditoro kaj debitoro (la esperantistaro), klaraj

ciferoj ĉiam estas necesaj, unue pri tio, por kio la pruntita mono estis uzita antaŭ la milito, kaj due pri la mono, profitita de la postmilitaj kongresoj, irinta por pagi tiun prunton.

Certe en ambaŭ okazoj, aŭ donacinto aŭ pruntinto havas la dankemon de ni ĉiuj, kion cetere la kongreso esprimis per speciala rezolucio. Sed neniu miru, se la juna viro - la movado - deziras ne plu vivi per pruntoj, sed volas starigi sian vivon sur la firman bazon de budĝetoj kaj bilancoj.

## FERMA KUNSIDO

Merkredo, la 13./8.

Unue, S-ro Applebaum raportis pri la Zamenhofa Monumento kaj laŭ lia propono la kongreso voĉdonas la jenan rezolucion:

*La XVI. Kongreso de Esperanto aŭdis kun plezuro pri la favora decido de la pola registaro, cedinta enirigi la monumenton en Polujon (El Skotlando, kie la monumento estis skulptita. Red.) sen iu dogana depago. La kongreso esprimas sian tutkoran dankon al la pola registaro pro la citita favoreco.*

En konvena tempo la monumento estos inaŭgurita kaj oficialaj institucioj esp. kun Monumenta Komitato zorgos, ke ĝi okazu kun la plej diversnacia delegitaro. Laŭ opinio de la polaj samideanoj tio estos ebla fine de 1925 aŭ printempe 1926.

## Pri evoluo de la lingvo

S-ro Kosteczki prezentis la proponon de Pola Esperanto-Societo, laŭ kiu la kongreso postulu de la esperantistaj organizaĵoj, gazetoj kaj individuoj, ke ili konformiĝu al ĉiuj lingvaj opinioj de la Akademio kaj Lingva Komitato.

En la debato la defendantoj de la propono akcentis, ke estas necese atentiĝi la verkantojn, ke ili estu pli singardaj en la provado de novaj formoj kaj esprimoj, pri kiuj oni antaŭe interkonsentu kun alilandanoj pere de L. K., por ke la lingvo ne disfalu pro ĉies ajn plezuro; se oni ne povas devigi iun ajn, ke almenaŭ la oficialaj institucioj obeu al la decidoj de L. K. kaj ke oni bojkotu la malbonajn verkojn por atingi disciplinon. (D-ro Bánó, S-ro Medem, Cohen, Wiesenfeld, Sós.)

La aliaj kontraŭe demandis, kiel do procedi, se unuflanke Akademio rajtas oficialigi formojn nur post ilia sufiĉe longa prova uzado kaj se aliflanke la plej bona aŭtoroj kaj gazetoj ne rajtas antaŭe provi novajn formojn; ili konsentas, ke lingva disciplino estas necesa, sed bedaŭras, ke L. K. ne faciligas la unuecon prokrastante la necesajn aldonojn al la Fundamento por kontentigi novajn bezonojn de tekniko kaj postmilita geografio; ke bojkoto estas tute ne ŝatinda procedo, ke pri landnomoj de novaj ŝtatoj Akademio tute ne faris decidon, ke la sufikso io, ekzemple, estas permesata laŭ la artikolo 15a de Fundamento en internaciaj landnomoj, kaj ke laŭ la deklaro de S-ro Cart, Prez. de Akademio mem, oni rajtas diri Germanio, Italio, Ruslando, Svislando apud Germanujo, Italujo, Rusujo, Svisujo; ke UEA sekve de tio ne plu uzas formojn Britio, Svisio, Polio (Eroŝenko, Jost, Hromada, Edmonds, Spielmann, Privat).

La kongreso fine akceptis la rezolucion, kiu laŭ la pola propono, modifita, „petas kaj morale postulas, ke ĉiuj konformiĝu al la Fundamento kaj al la rekomendoj de L. K. pri aldonoj al ĝi, sed aldonas laŭ propono de S-ro Edmonds la deziron, ke la Akademio kiel eble plej baldaŭ forigu la mankojn en nia vortaro sur la kampoj de moderna tekniko

kaj geografio kaj ankaŭ, ke ĝi preparu liston de permeseblaj landnomoj post atenta studado de diversaj uzataj formoj kaj post enketo ĉe Universala Poŝta Unio.

### ANTAŬKONGRESAJ TAGOJ EN PRAHA

Kiel niaj legantoj scias laŭ la antaŭaj informoj la Prahaj samideanoj havis okazon akcepti kongresan karavanon el Berlin kaj Dresden, en kiu krom esp-istoj germanaj estis ankaŭ samideanoj el Britlando, Nederlando, Ruslando kaj Svedio, entute 120 personoj. La tuta aranĝo okazis laŭ la programo, en iu rilato, ekz. loĝiga eĉ pli bone ol esperis ni, kiuj nur la lastan tagon povis ricevi informojn pri liberaj ĉambroj (krom hotelo Beránek, kie la ĉambroj estis rezervitaj jam longe antaŭe, ĉar la hotelo estas unu el la plej multĉambraj en Praha.)

La gastoj venis en du specialaj vagonoj de Berlina rapidvagonaro, marde la 5 Aŭgusto, post la 16a horo kaj estis akceptitaj de S-ro *Hromada* en la nomo de ĈAE. En la atendosalono de la klaso ni dividis la gastojn en parton Berlinan kaj Dresdenan. Al la gvidanto de la unua, S-ro *Blankenheim*, ni povis transdoni por ĉiu karavanano blankan bileton kun respektiva nomo kaj ĉambro-numero de la hotelo Beránek. Tiamaniere la procedo en la hotelo estis tre simpla: sufiĉis prezenti tiun bileton kaj oni ricevis ĉambroŝlosilon. Por la Dresdena karavano ne estis eble havigi unu hotelon kun 60 ĉambroj liberaj por unu nokto, ĝiaj membroj devis do loĝi en *Štěpán*, *Zlatá Husa*, *Gráf* kaj *Union*. Ĉiu el ili ricevis de ni pere de sia gvidanto S-ro *Feder* bileton por ĉambro laŭ sia elekto, ĉiu hotelo alia koloro.

Kvar (anstaŭ tri) tramvagonoj, senpage disponigitaj al ĈAE de la Elektraj Entreprenoj de Praha, transportis la gastojn ĝis iliaj hoteloj, vekante per sia esp. ornamo la atenton de la publiko surstrata.

De la 18 ĝis la 20a horo la gastoj vizitis la urbon sidante en tramo, kiun ni direktis tiamaniere, ke ili dum tiu veturo vidu kiel eble plej multe da vidindaĵoj; de la hotelo Beránek, preter la Muzeo, tra placo de *Sta Venceslao* al la Nacia Teatro, kajo de *Masaryk* kun panoramo de *Hradčany*, ponto de *Karolo IV.*, preter la Universitato, Parlamento, trans ponto de *Mánes* al *Blindulejo Klár*, supren al *Hradčany*. Tie elvagoniĝinte ni trairis la kortojn de kastelo, admiris la monumentan konstruaĵon de ĉefpreĝejo de *Sta Vito* kaj de teraso ĝuis la rigardon al panoramo de Praha. Malsuprenirinte preter la strateto de alkemistoj al la *Blindulejo*, ni trame daŭrigis preter *Studenta Domo* (*Strakovka*), trans ponto de *Ĉech*, preter *Malnova Sinagogo*, *Urbo-domo*, *Monumento de Jan Hus*, tra strato *Celetná*, *Pulva Turo*, preter *Reprezenta Domo* kaj stacidomo *Masaryk* kaj *Wilson* al la hotelo Beránek, kie vespere okazis amika kunveno.

Je la 7a matene, la gastoj transportitaj ree trame de siaj hoteloj al la stacidomo *Wilson*, forveturis kune kun ĉs. samideanoj, en tri specialaj vagonoj al *Wien*, konservante espereble agrablajn rememorojn pri sia mallonga restado en Praha.

Nezbytná pomůcka každého českého esperantisty:  
**SLOVNÍK ESPERANTSKO-ČESKÝ.**

Seslavlil V. Čánský a L. Riedl. Podrobný, 309 str.  
Cena 20 Kč fr. Obstaráme.

### POSTKONGRESA KARAVANO AL GROVARO ĈE ABISMO MACOCHA

Ĵaŭde, la 14 Aŭgusto, je la 6a matene forveturis el *Wien* (*Nordbahnhof*) grupo de 32 samideanoj el 9 Nacioj kaj 30 ĉeĥoslovakaj al Praha, kun programo viziti survoje la faman grotaron stalagmitan kaj stalaktitan ĉe la abismo *Macocho*, proksime de *Blansko* apud *Moravia ĉefurbo Brno*. La karavanon gvidis S-ro *Hromada*, en la preparado (specialaj vagonoj de la ĉeĥa limstacio *Břeclava*, speciala haltigo de la rapidvagonaro en *Blansko*, tagmanĝo kaj aŭtobusoj, rabato enirpaga (helpis afable *Moravia Turisma Asocio* kun S-ro *Barviř* en *Brno*. Aŭdinte la esprimojn de kontenteco de la partoprenintoj, ni rajtas juĝi, ke ĉio bone funkciis kaj ke neniu bedaŭris sian partoprenon en tiu ĉi vizito, ekstreme malmultekosta, sekve de la 50% rabato feroja kaj aliaj faciligoj.

## LINGVA FAKO

### PĚKĻAD VII. TEKSTU.

#### VŪSLEDEK:

Doŝlo 8 pĚkĻadŭ, z nichŭz odmĚnĚny broŭzuru Svaz nŕrodŭ o esperantu prŕce, jeŭz zaslali pp.: Dostŕl Rud. Vŕdeň, Klenka Fr. Bohdaneĉ a Suh Vŕclav NeumĚř.

Ĉu estas necese <sup>1)</sup> konduti <sup>2)</sup> al ĉiuj homoj<sup>3)</sup> en la sama maniero <sup>4)</sup>? Nepe ne! <sup>5)</sup> Estus maljuste fari por individuo mallaborema, malklera aŭ egoista <sup>6)</sup> tion, kion oni devas fari <sup>7)</sup> por homo pli supera laŭ la spirito aŭ la karaktero <sup>8)</sup>; estas do nia devo direkti nian estimon <sup>9)</sup> kaj nian sindonon al la aliaj laŭ la valoro de ilia morala personeco, ne laŭ ilia deveno, ilia riĉeco kaj titoloj.

<sup>1)</sup> ĉu oni devas <sup>2)</sup> rilati <sup>3)</sup> agi kun <sup>4)</sup> sammaniere <sup>5)</sup> absolute ne, tute ne <sup>6)</sup> lepŝi neŭz jednŕm slovem: mallaboremulo, malklerulo, egoisto <sup>7)</sup> zde nikoli: ni estas farontaj, ponĚvaĉ neni dŭvodu stŕrati pojnom devo, jelikoŭz se zde vskutku jednŕa o povinnost <sup>8)</sup> spirite kaj karaktere <sup>9)</sup> respekton.



### PĚKĻAD VIII. TEXTU.

#### VŪSLEDEK.

Doŝlo 9 pracŕ, z nichŭz 3 odmĚnĚny broŭzuru: Svaz nŕrodŭ o esperantu. Jsou to pracĚ, kterĚ zaslali pp.: Dokoupil Rud., Trebŕĉ, Havrda Vŕclav, Dobřichovice a Štěĉh O., Jilemnice.

**Hundo kaj rivereto.** Hundeto havante nenion por fari, ekintencis konfuzi la rivereton en ĝia murmetado. Li<sup>1)</sup> do komencis forte boji<sup>2)</sup>, sed baldaŭ li laciĝis. Ĉagrenita pro sia malsukceso, li demandis la rivereton: „Pro kio do neeble (estas) vin erarigi?“ La rivereto respondis al li: „Kiu havas sian celon difinita, per nenio lasas sin konfuzi.“<sup>3)</sup>

<sup>1)</sup> Pes zde jednŕa jako osoba, moŭzno tudŕz po- uŭtŕti osobnŕho zŕjmena, <sup>2)</sup> bojĝi, <sup>3)</sup> estas per nenio konfuzebli.

## BIBLIOGRAFIO

**Al eterna paco de Imanuel Kant.** Tradukis P. Christaller, eldonis *La Batalanto, Dro Fricke*. Paĝoj 88, prezo 15 Kč. La tradukita filozia traktaĵo devenas el sepdeka jaro de la glora filozofo, estinte verkita en j. 1794. Ĝi pravas la kontraŭsociajn originojn de la militoj kaj la bezonon, ke la juro estu bazita sur konfederado de liberaj ŝtatoj. Al la tradukita traktaĵo estas aldonitaj ankoraŭ kelkaj citaĵoj el la aliaj verkoj de Kant koncernan aj la saman temon. La legado de la libro estas interesa ne sole pro la enhavo sola, sed ankaŭ por konstato, kiel en bona esperanta traduko la pezaj kaj komplikaj frazoj de la Kanta stilo estas pli rapide kompreneblaj ol en la germana originalo. La traduko estas farita efektive lerte kaj zorge. La eminenta aŭtoro preferas la vortojn kiom eble plej mallongajn, kaj la rezultato montras, kiel esprimkapablaj kaj klarsencaj estas adjektivoj derivataj de verbaj radikoj sole per finiĝo-a. Ekz.: leĝoj permeasaj, postulaj, malpermesaj (latine: *leges permissivae, praeceptivae, prohibitivae.*) Sed kelkaj mallongigoj de internaciaj radikoj tamen ŝajnas al mi dubaj. Diri empiro, kategorio k. s. anstataŭ empirio, kategorio ŝajnas eble pli praktika kaj oportuna, sed tiu ĉi maniero laŭplaĉe ŝanĝi la radikojn jam longe uzatajn en formo pli internacia enigis pluan haŭson en la vortaron esperantan, jam nun neagrabla haoson, kaj profito nenia el tio rezultas. La aŭtoroj devus propravole subigi siajn plaĉojn al zorga atento de ĉiuj radikoj uzataj, kaj eviti uzadon de novaj, escepte la okazon, kiam la malnova radiko estas malbona, netaŭga aŭ nepreciza. Sed tiu ĉi riproĉo koncernas sole malgrandan parton de la uzitaj vortoj. La plimultaj povas trovi sole aprobon. Precipe mi laŭdas uzadon de „juro“ en senco objektiva rajtaro, ne en senco „juroscienco“. Ĉu „vegetalo“ ne estas pli taŭga ol „planto“, kiam vegetaloj estas plantataj kaj neplantaĵoj? — La legado de tiu ĉi libro estas tre rekomendinda, kaj neniu grupo forgesu enmeti ĝin en sian bibliotekon. S. K.

**Riedl: Antikva melodio Praha 1924.** *Propra eldono. P. 36. Prezo ?*. La nova poema kolekto de juna aŭtoro estas ciklo de 11 „kantoj“, priskribantaj historion pri parte reala, parte fiktiva amatino, kiun revas la poeto sur insulo en Adrio-maro. La formo de versoj estas multe progresinta. La daktiloj estas seneraraj kaj tre agrable legeblaj, la esprimmaniero klara kaj simpla, sed ĝi ŝajnas al mi iom tro „papera“. La nova konkeranto de Parnaso akceptu sinceran gratulon pro la lerta uzado de sia instrumento, sed samtempe ne malpli sinceran kuraĝigon meti al si ankaŭ pli gravajn problemojn pri enhavo idea. La amo ne estas sole ludo, en estrado de problemoj erotaj oni nur ekkonas la majstron. S. K.

